

MAGAZINO

Organo de Libera Esperanto-Asocio / Germanio (LEA/G)
Membro de LEA - Komitato de S.A.T. Paris
Organ des Freien Esperanto - Bundes in Deutschland

Die nicht geschriebene Schlagzeile

Da war doch damals die Weltbevölkerungskonferenz in Kairo (Aegypten) - wer erinnert sich noch daran? In den Fernseh-Sendungen sah man eine pompöse Eröffnungsfeier, einige Delegierte machten 'viel Wind', hielten 'aufsehenerregende' Reden. Später dann stritt man sich darüber, ob man die Bevölkerungsexplosion bremsen sollte. Wenn ja - wie? Oder doch nicht? Die Chinesen tun ja schon was, auch, wenn Rom dagegen ist. Schließlich endigte die Konferenz ergebnislos. "Außer Spesen nichts gewesen!"

Die nachstehenden Zeilen waren für Fernsehstationen und auch Zeitungen scheint's keine Veröffentlichung wert, vielleicht unter 'femer liefern' oder zwischen Berichte über das Liebesleben der Lady Di. Nachstehend die Meldung wortwörtlich:

Globales Babylon

Auf internationalen Konferenzen machen häufig Fachbegriffe Karriere unter denen die Teilnehmer höchst Unterschiedliches verstehen. So berichtet jetzt eine Veröffentlichung der Gesellschaft für Technische Zusammenarbeit (GTZ) von der Weltbevölkerungskonferenz in Kairo, wie einige überforderte Simultandolmetscher mit dem Begriff *reproductive health* umgegangen waren. Darauf wurde wahlweise "Gesundheit der Fortpflanzung" (deutsch), "Ehegatten nehmen nach der Geburt Urlaub voneinander" (arabisch), "Die ganze Familie geht auf Urlaub" (russisch) und "Ferien auf dem Bauernhof" (chinesisch). Wen wundert's, daß die Delegierten oft aneinander vorbeiredeten?

Ni esperantistoj ofertas la tradukon: 'reprodukta sano' - ĉu vi komprenas?

KFK

Traduko: La ne-aperigita presita linio

Siatempe okazis en Kajro/Egiptio Konferenco pri Monda Loĝantaro - kiu memoras pri ĝi? Nu, ja, en televido oni vidis pompan inaŭguran solenaĵon, kelkaj delegitoj oratoris elokvente kaj 'produktis multan venton' (kiel ni diras en Germanio). Pli poste la delegitoj disputis, kverelis pri metodoj bremsi - aŭ ne? - la eksplodon de la monda loĝantaro. La ĉinoj ja jam faras ion malgraŭ Romo estas kontraŭ. La konferenco finis sen rezulto: "Escepte de elspezoj nenio okazis."

La subaj linioj estis ŝajne senvaloraj por televidaj stacioj kaj presorganoj publikigi ilin. Se publikigitaj tiam sub 'krome okazis' aŭ inter informacioj pri la ama vivo de Lady (sinjorino) Di. Jen la informo :

Tutmonda Babilono - Dum Internaciaj konferencoj ofte fakterminoj karieras, kiujn konferenc-partoprenantoj diference tradukas. Kompanio por teknika kunlaboro komunikis de la Konferenco pri Monda Loĝantaro kiel profesiaj simultan-tradukistoj tradukis la terminon *reproductive health*: 'Sano de l'generado' (germana), 'Geedzoj ferias ĉiu sole post la naskiĝo' (araba), 'La tuta familio ferios' (rustraduka) kaj 'Ferioj en la bleno' (ĉinia). Do, ne miraklo ke la delegitoj paroladis kaj tamen unu la alian ne komprenas.

Esperantistoj senpene tradukas: Reprodukta sano.

(Kompilis: KFK k. AFS)



STRIKO EN FRANCO SOZIALA REDUKTO EN GERMANIO

Post la sesa kaj ĝis nun plej forta atomtesto en suda Pacifiko komencis spekuladoj, ke la 'fama' franco, amata prezidento Jaques Chirac (Ĝak Ŝrak), rekomendos al la francaj militaristoj ĉesi la forĵeton de popoloj impostoj. Jus mi povis admiri lin en televido, kie li proklamis finon de la testoj. Mi esperas, ke Ĝak havigis al si permeson de 'nia' Helmut (familia nomo: Kohl) ĉesi mendodisdonon al la armita industrio. Jes, inter ili ankaŭ la nia.

Tamen laboristoj en armita industrio 'perdos' laboron, Ĝak urĝe bezonas monon por kvietigi strikantojn kaj senlaborulojn en francaj landoj. Al la francaj kapitalposedantoj li certe sendos pardonpeto leteron promesante, iam kontinui la testojn kun financa helpo per germanaj impostoj, ĉar kancelero Helmut ŝatas eniri la historion kiel la nekomparebla konzervativa politikisto zorginte, ke Germanio estis preskaŭ atompotenco. Felice ni ne rajtas esti tion, alle...!?

La sociala reto en Germanio estas truita, laboristoj trafatas en senlaboreco kaj impost-defraŭdantoj kiel la patro de Steffi Graf timas, ke la financ-aŭtoritatoj nun vere postulos la pagon. La reunuiĝo kostas monon.

Ge-kolegoj, ge-kamaradoj, mi solidariĝas kun vi tamen mi estas pensiulo. Hej, kion mi ĵus legas? "En okcidenta Germanio unufoje minacas la malaltigon de la pensioj." Fulmotondro, nun mi devos supreniri la barikadojn! Stefano

SVEDA LABORISTA ESPERANTO ASOCIO

Jarkunveno de SLEA okazos 19. ĝis 21. de aprilo ĉj. en Esperanto-Centro, Masthuggsgården 1, Gotenburgo. Komencos je 14-horo.

SLEA invitis reprezentanton de nia LEAG kaj ofertis por ili ŝi senkostaŭn tranokladon en Naturamika Domo.

LEAG-Estraro dankas vin tre amike por via invito kaj deziras plenan sukceson de l'jarkunveno. En 1996 LEAG ne aranĝos jarkunvenon. Tamen elkoran dankon por viaj bondeziroj. LEAG ege aktivus i.a. inter naturamikaj esperantistoj en suda Germanio. Ĉu ni fine sukcesos...?

Sennaciece salutas LEAG-Estraro

SENLABORECO

La germana ĉefproblemo estas la alta senlaboreco. La Eŭropa Unio kalkulas por 1996, ke 17 milionoj da homoj en la 15 landoj estos senlaboraj. Tiu evoluo puŝas la homojn flanken. Junuloj malesperas, ĉar ili ne vidas bonajn perspektivojn. La maljunuloj sentas timon, ĉar la sistemo de la sociala sekureco havas fendojn.

Malgraŭ tio tagon post tago laborlokoj estos neniigitaj. Parte tion decidas la samaj personoj, kiuj priplendas la senlaborecon. Ofte okazas tio en entreprenoj, kiuj havas altan profiton, kaj ili samtempe maldungas kunlaborantojn nur por ricevi ankoraŭ pli altan profiton. La manĝeroj ricevas aplaudon de la grandakciuloj. Mi nomas tion „pura“ kapitalismo. Kie restas la socia respondeco? Ĉu tio ankoraŭ estas „sociala“ merkatekonomio?

KHK

Apemoloj/Impressum
MAGAZINO - LEAG organo
Eldonanto/Herausgeber:
LIBERA ESPERANTO-ASOCIO
Freier Esperanto-Bund
Sitz: D-77704 Oberkirch (Baden)
Renchener Str.47, Tel:07802/90336
Redaktantoj/Redakteure:
A.F.STEPHAN, Oberkirch (AFS)
K.H.KERSTING, Essen (KHK)
Hans RODEWIG, Hannover (H.R.)
Margot STEPHAN, Oberkirch (MSI)
Pri siaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi ensendojn.
MAGAZINO aperas/erscheint kvarfoje/vier mal jare/jährlich.
Abono: 15,- DM aŭ 8 IRK - Membrokolizo entenas liveradon de l'bulleteno/Mitgliedsbeitrag enthält Lieferung des Organs.
Konto: Kersting Sonderkonto
N°416210-432 Postbank Essen
(BLZ 360 100 43)

1927: Senlaboruloj en Germanio



Interezo

En enciklopedio mi legis la nomon Gottfried Feder kun la anekso: (1883 — 1941) nazia ekonomia teoriisto.

Jam 1918 montris Feder per sia publikaĵo „Forigi de la Interéz(Rentum)sklaveco“ la solvon de la ekonomia mondkrizo. Adolf Hitler transprenis la ideon en sia programo de la nazia partio. Post kiam Hitler 1933 fariĝis regna kanceliero, Feder ricevis altan postenon (ŝtatssekretario) ĉe la regna ekonomia ministerio. Hitler uzis la ideojn de Feder kaj per tiuj li laborigis la germanan popolon. La senlabor-eco malaperis. Tamen, supozeble, kiam Feder vidis, ke Hitler misuzis la per si mem bonajn ideojn por prepari la militon, li ekŝigis el la ofico ĉe la ekonomia ministerio. La malfrua sorto de Feder estas nebula. Laŭ la enciklopedio li mortis 1941, sed laŭ onidiro li mortis jam 1935 per aranĝita aŭtoakcidento.

Feder atentigis (1918), ke la industrikapitalo en la tiama Germanio estis nur 5% de la ŝuldoj. La germana popolo devas pagi imposton, por ke ĝi povas ricevi interezojn de siaj militobligacioj. Sed nur la plej riĉaj havas profiton de tio. Feder proponis, ke oni repagu ĉiujn ŝuldojn, sed ne plu pagu interezojn.

Hodiaŭ multaj malriĉaj landoj ne plu povas pagi la interezojn per la eksporto de siaj varoj. La grandaj bankoj devas pruntedoni al ili pli da mono.

Eĉ en la plej riĉaj landoj la registaroj devas ŝpari por ke la pasiva kapitalo de malmultaj riĉegaj homoj povas kreski. Bedaŭrinde la registaroj ne ŝparas ĉe la armiloj, ĉar per tiuj la riĉuloj povas gajni pli multe, ĉar armiloj rapide malnoviĝas.

Ĉu ni devas ŝanĝi la mono-regulon?

KH Kersting

Rentumo kaj interezosarĝo komparitaj

5% ŝparinterezojn, tiel tekstas la anonco de iu banko. Tio estas preskaŭ karitata. Sed ĝi estas la ĝenerale uzata interezoglorado, kiel ankaŭ en la lernejoj ĝi estas instruita. La vastaj amasoj de la popolo naive kredas tion laŭvorte.

Sed ni faru alian kalkulon.

Iu komparebla persono ricevas por sia ŝparbondaĵo jare 5000,- DM da interezoj. Oni povas opinii, ke tio estas granda kvanto. Sed se oni komparas ĉi-tiun rentumon kun la efektiva interezosarĝo, tiam la respektplena interezoplus transformiĝas al katastrofa interezominuso.

Se la komparebla persono loĝas en luita loĝejo kaj pagas ekzemple luprezon de jare 10000,- DM, tiam li/ŝi pagas 7000,- DM por interezokostoj.

Ĉiuj produktistoj de varoj havas altajn interezokostojn, kiuj altigas la varprezojn. Oni kalkulas, ke la interezokostoj sumiĝas ĉe varoj kaj servoj inter 30 kaj 50%.

Krome oni devas kalkuli la interezojn, kiuj devenas de la ŝtatsuldoj. Ili kaŝiĝas en la impostoj.

Laŭ eldiro de iu matematikisto nur tiu havas interezoprofiton, kiu — se li/ŝi bezonas ekzemple jare 72000,- DM da elspezoj por la vivtenado — ricevas aliflanke minimume 24000,- DM da interezoj. Tio estas 33%.

La faktaj interezogajnintoj estas la posedantoj de la “granda” kapitalo, tio estas proksimume 4% de la loĝantaro. Ili posedas pli ol la duonon de la tuta monkapitalo. La resto, t.e. 96% de la loĝantaro, estas la perdintoj.

KHK

Satata LEA/G-ano, abonanto,

se tiu ĉi ciklo estas ruĝe signita via kotizo/abonsumo por 1996 ne jam atingis LEA/G-kason ĝis 29-a februaro ĉi. Ĉu ne plu interesas vin membreco en LEA/G resp. legado de MAGAZINO? Kiam jes, ni vere tre bedaŭrus vian decidon. Aliakaze bv. ĝiri 15,- DM al nia konto: Kersting Sonderkonto N°416210-432 Postbank Essen (BLZ 360 100 43). Klam vi aĉetos librojn, broŝurojn, de LEA/G bv. uzi por via ĝiro la konton de Albert F. Stephan, N°0740902 Deutsche Bank AG Oberkirch (BLZ 664 700 35). Dankon!


Falls Sie Ihren Jahresbeitrag oder Ihr Abo für 1996 15,- DM - noch nicht überwiesen haben, benutzen Sie bitte das o.a. Sonderkonto Kersting für Ihre Zahlung. Besten Dank im voraus.



Salutas vin sincere via
LEA/G-prezidanto
Albert Stephan

La "MICHELINE" — 1^{re} auto-rail sur pneus, Créé par le PNEU MICHELIN

Le 10 septembre 1931, une "MICHELINE" effectue PARIS-DEAUVILLE en 2 h. 03, à 107 km. de moyenne, battant de 32 minutes le rapide de luxe.



Relbuso 'Micheline'

Julio 1995 rendezuo en Oberkirch. En restoracio sidis kune francaj kaj germanaj esperantistoj. Iu el la rondo parolis pri francaj baptonomoj kaj menciis la inan nomon Micheline, en Esperanto: Mikaelena. Mi rakontis, ke la nomo estas ankaŭ uzata por relbuso (germanlingve: Schlenenbus) kaj klarigis, ke oni nomas tiujn veturilojn 'Micheline', ĉar la unuan konstruis la fama fabriko Michelin. Ne ĉiu homo en Francio konas la devenon de tia nomo por relbuso.

La 10-an de septembro 1931 tiu 'Micheline' veturis de Parizo ĝis Deauville en 2 horoj kaj 3 minutoj t.e. 107 KM po unu horo. Ĝi estis 32 minutoj pli rapida ol hodiaŭa luksa rapidtrajno.

Pli poste Michelin-fabriko (por pneŭmatikoj) konstruis similajn modelojn sed kun du vagonoj. La laste fabrikitaj relbusoj estas tiuj, kiujn oni ankoraŭ hodiaŭ povas admiri.

Gerard Guy

Notizen

Die Menschen sind verschieden. Manche sind konservativ und schütteln schon ablehnend den Kopf, wenn sie nur daran denken von Allherge - brachtem abweichen zu sollen, andere sind hypermodern, jagen von einem Trend zum anderen, sind dem Zeitgeist immer eine Nasenlänge voraus, sind immer >in<.

Beiden Extremen wird es wohl verwehrt bleiben, aus neuen Richtungen fruchtbare Erhasungsernte ziehen zu können. Sei es, weil sie sich von vorne herein dem Neuen verschließen, sei es weil sie sich keine Zeit zum Nachdenken nehmen. Frage: Findet man unter diesen Charakteren Freunde für die internationale Sprache Esperanto?

Ankoraŭ poemo

Nia kamarado Erich Seidemann kune kun sia edzino Elfi riskis ŝipan krucveturadon lastan januaron. I.a. ili partoprenis karnavalajn okazaĵojn en Brazilo. Helpis al Erich Esperanto-scigoj por interparoli kun alogaj malabunde vestitaj belulinoj. Li verkis pri tio poemon, kiun ni ne volas deteni al la legantaro:

Rara travivaĵo

Dum la lasta karnevalo
ĉe la bela loko
sub freŝa akvofalo
meze en la Orinoko
mi renkontis reptilbestojn...
Ĉar mi karesis ties vestojn,
mi rajtis finfine kun ili
libere krokodil!

*laŭ edzina permeso!

©©©© ©©©© ©©©©

Salminejo

Proksimume dudek kilometroj sude de la Aŭstra urbo Salzburg en la plej sudorienta angulo de la Germana Federacia Lando Bavario situas ĉarma altmontara urbeto Berchtesgaden. Tie oni povas viziti vidindaĵojn, nome salminejojn. Ĝi troviĝas en salhavanta monto, kiu nomiĝas Salzburg (salmonto).

Jam dum pli ol 400 jaroj oni ekspluatas la monton. Ŝaktoj kaj galerioj estas fositaj. La salmonto ne enhavas puran blankan stonsalon; ĝi estas miksitaj kun argilo kaj gipso. Por gajni puran salon por nutraĵaj celoj, oni fosis multajn ovalajn kavadojn en la monton, en kiujn oni kondukas puran fontakvon. Tiel la salo solviĝas, dum gipso kaj argilo malleviĝas kaj formas tavolojn sub la sallago. Post kvar semajnoj la lago estas saturita de salakvo kun ĉirkaŭ 26% da salo. La salakvo mem estos elpumpata kaj kondukata per tuboj al kelkaj urboj en Suda Bavario i.a. al Bad Reichenhall, kie troviĝas sallarejoj. Oni vaporigas la salakvon en grandaj kaseroloj kaj gajnas puran salon taŭgan por kuirado. Salakvo ankaŭ estas uzata kiel kuracilo. Oni banas en ĝi kaj post konduko tra branĉfaskegoj inhaladas kurace.

Germanlingvaj lakesprimoj:

Salminejo - Salzburgwerk; ovala kavado - Sinkwerk; salakvo - Sole; salfarejo - Saline; kuracilakvo por bani - Solebad; branĉfaskego - Gradierwerk; la nomparto „Bad“ ĉe Bad Reichenhall devenas de „bano“, do kuracloko.

KHK



Kongresmemoroj

Dum SAT-kongreso antaŭ jaroj mi sidis vespere kune kun geamikoj en eta rondo. Ni trinkis bonan vinon kaj babilis pri ĉiutagaj okazaĵoj. Iu virino el la rondo rakontis pri filmo, kiun ŝi vidis en televido.

**SCIADO
ESTAS
POTENCO!**




La loko de la filma paso estis ie en Parizo. Aktorino kun ĉefa rolo ludis domportistinon (concierge), sed preskaŭ kiel megero. Mi demandis la rakontistinon, kiu vivas en Parizo, ĉu ĉiu domportistino estas tiel megera? Ŝi opiniis, ke nur kelkaj estas koleraĵoj, sed ĉiu volas scii pri tio-kio okazas en la domo.

Ŝi rakontis, ke iam domportistinoj strikis kaj marŝis protestinte tra la stratoj. Kelkaj portis afiŝojn kun diversaj surskriboj. Sur unu afiŝo staris:

Sciado estas potenco!

Karlo



Mi amas Parizon!

Peticio

Lastan someron mi feris en regiono, kie la amasa turismo ankoraŭ estas nekonata.

Estis senbrua somernokto. Mi sidis antaŭ somera dometo en la ĝardeno, trinkis glaseton da vino kaj kontemplis la stelluman firmamenton. Dum la noktoj meze de monato Aŭgusto oni vidas multajn falstelojn, la t.n. meteorsvarmon „Persejden“.

Antaŭ multaj jaroj estis la someraj noktoj preskaŭ ĉiuloke tiel kvietaj. Kie oni trovas nuntempe kvieton, silenton? La bruego, ĉefe la asfalta bruo penetras ĝis en la lastan dezerton. Ni fariĝis malriĉuloj. Hodiaŭ mankas al ni fundamentaj valoroj, tio estas bona akvo, pura aero kaj trankvileco.

Dum tiu nokto la kontemplado por mi ne daŭris longe. Sur la proksima ŝoseo tondris neatendite la motoro de iu aŭto. Iu malfruiginta reveninto furioze preterveturis. Mi esperis, ke lia ensanga alkoholo ne estis tro alta. Mia animstato — aŭ ĉu mi devas diri humoro? — forvaporigis.

Mi petas je kelkaj senbruaĵaj somernoktoj, por ke mi povu revii per malfermitaj okuloj.

K. H. K.

Edukado

Loko de okazo: Butikcentro sur la „verda herbejo“. Tie ne mankas aŭtoparkejoj.

Jen juna geedza paro kun filineto — ŝi havas ĉirkaŭ 6 jarojn — puŝas plenplenan butikuman ĉareton al sia auto. Tie ili elprenas la aĉetitajn varojn el la ĉareto kaj el la pakumoj por meti en la aŭton. Poste diras la patrino al la filineto kaj montras al la pakumoj: „Forĵetu tiun sentaŭgaĵon!“ La malgrandulino prenas ĝin kaj post dek paŝetoj ŝi ĵetas la rubaĵon sub iun alian aŭton. „Panjo“, fiere krias la filineto kaj montras la rubaĵlokon, „ĉio estas for!“ Kaj kion diris panjo? „Vi faris tion tre bone, mia karulino.“

K. H. K.



Du studentoj taksas konstruon ĉu ĝi taŭgas por demonstracio. Rekomendas la unu al la alia: „Eniru la ruinon kaj demandu, kion okazas per ĝi, mi organizos intertempe jam kontraŭan demonstracion.“

Ni legis



en la **Kajeroj el la Sudo** -Apr./Jun. 1995-
bulteno de HALE (hispana LEA):

„ . . . niaj sindikatoj burokratigis, kaj tio estis la sola signo de modernigo de niaj reprezentantoj; la laboristoj ne tro atentis pri la aktualaj problemoj de nia socio kaj uzas ankoraŭ rimedojn kaj solvojn elpensitajn en la pasinta jarcento kaj komenco de la nuna. Renovigo de niaj sociaj sistemoj estas absoluta neceso. Solidara politiko favora al la plej malfortaj homoj urgas. Alia grava problemo koncernas tiujn el niaj kompanoj, kiuj sin lasas treni de regresemaj naciismaj ideoj. Ni ne povas toleri la progreson de perfortaj sistemoj, kiuj ĉe la sojlo de la 21-a jc. revas ankoraŭ pri starigo de limoj kaj aliaj baroj inter la homoj. Mi konkrete aludas la naciismon kaj la naciistojn: La naciismoj estas ĝisfunde perversaj kaj nur detruon kaj morton prezen tas kiel novaĵon. Kiel en tiu ĉi momento en Centra Eŭropo kie ili aperis sub civilizita masko, aŭ tiu pli primitiva en Burundi. Kaj en aliaj lokoj de nia planedo
Ni ne rezignacias al pasiveco antaŭ la problemoj de la laboristaro nek antaŭ la violento de la regresemaj naciismoj.“

Cu tro pesimisma?

Cu la „paco“ en iama Jugoslavio restas, estas necerta.

La mondo, la UNO, la NATO tro longe spektis perplekse kaj senage kiel potencavidaj politikistoj mem ne ektimis pro genocido. Oni decidis armilo- kaj benzino-bojkoton. Tamen neniu ĝin efektivigis korekte. Supozeble, ĉar la privataj kaj ŝtataj armilproduktistoj ricevis grandan profiton. Kiom valoras homa vivo? Precipe, ĉar la afero okazis ekstere de propra lando. Certe oni konsente aplaudis deklaraciojn, tamen ili ne estis kompensaĵo por la necesaj praktikaj paŝoj.

KHK

*Subtenu S.A.T. Via afabla kontribuo helpas forigi financajn malfacilaĵojn. S.A.T. preskaŭ ne eblas, ricevi kotizojn el nepagipovaj landoj. Konto por germanaj SAT-membroj: Jiri Proskovec, Dortmund
Konto 9168-434 Postbank Essen (BLZ 36010043)*

Kulinara angulo

Supo kulrita en 15 minutoj

Maiz-krem-supo

VI bezonas: 2 ujoj maizo (po 285 gr enpezo), 3/4 litroj buljono kokaja, 1 cepo, 30 gr butero, 1 ruĝa papriko-guŝo, 1/8 litro seka blanka vino, 100 gr kremo freŝa, salo, kareo, 1 eta zucchino.

Preparo: Malzon senakvolgu, tiun el unu skatolo reboligu kaj poste 5 minutojn per malalta grado de varmego. La cepon senŝelligu, el ĝi faru fajnajn kubojn kaj friti ilin vltrece en butero. Distranĉu la paprikon, deprenu la semajon, purigu la paprikon, senakvolgu ĝin kaj preparu fajnajn kubojn. Fritu ilin ne tro longe kune kun la cepo. Kulritan maizon kun la likvaĵo kaĉigu kaj kulru ĝin denove kune kun la maizo el la dua skatolo, vino kaj kremo freŝa, ekprovu guston per salo kaj kareo. Enmiksi cepo-kubojn kaj paprika-kubojn. Purigu kaj sekigu la succhinon kaj raspu ĝin fajne. Farĉu la supon en supujon kaj garnu ĝin per zucchino. Manĝu la supon kune blanka pano.

MSI.

Parolas Varsovio
en Esperanto!

Pola Radio disaŭdigas en Esperanto du elsendojn tage: 15.30 h - 31,5 m; 41,18 m; 41,99 m; 50,0 m
(=9525, 7285, 7145, 6000 kHz)

22.30 h - 49,71 m; 49,22 m

(= 6035 kaj 6095 kHz)

La elsendo-horoj estas indikitaj en la vintra mezeŭropa tempo! Pola Radio estas aŭdebla en tuta Eŭropo, de Mediteraneo ĝis Rovaniemi.

Konstantaj programeroj

tago	15.30 h	22.30 h
lundo	homoj k.problemoj	koncerto/bondeziroj
mardo	koncerto/bondeziroj	Esp.gazetaro
merkredo	Esp.gazetaro	familiaj temoj
ĵaŭdo	familiaj temoj	kultur-temoj
vendredo	kultur-temoj	homoj k.problemoj
sabato	Esp.ekspreso	leterkesto
dimanĉo	leterkesto	Esp.ekspreso

Dimanĉe kroma radioelsendo je 12,30 h sed ricevota nur per satelito Eutelsat II F-3-16 gradoj de orienta latitudo; frekvenco 11,080 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 8,28 MHz.

4-an de aprilo Pola Radio festas la 37-an datrevenon de l'komenciĝo de sia elsendoj! Bv. ne forgesi sendi gratulleteron al:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio
Poŝtfako 46, PI-00-977 Varsovio (Pollando)

Per tiu eldono de MAGAZINO LEA/G kaj la redakcio tutkore gratulas!

Informpeto

La Verda Proleto estas la oficiala gazeto de SATEB. SATEB = SAT en Britio, do la brita LEA.

La jarkunveno 1995 de SATEB okazis Aprilo 1995 en Barfoston. Notoj pri la jarkunveno mi legis en n-ro 397 (Julio 1995) de La Verda Proleto. Pripensinda estas la frazo: „Ĉeestintoj petis de la redaktoro de la gazeto pli da angla-lingvaj artikoloj.“ Al tio skribis Krys Ungar sekvantan leteron al la redaktoro de La Verda Proleto (n-ro 398 — Okt. 1995):

„ Se iu skribas al gazeto ekz. 'El Pais', postulante, ke ĝia kovrilpaĝo aperu en la angla, ĉar li kiel komencanta lernanto de la hispana ne povas kompreni la hispanlingvajn artikolojn, tiu estus entute priridata. La komunumo de hispanparolantoj kompreneble atendas, ke ĝiaj gazetoj estu en la lingvo de tiu komunumo. Same eblus diri pri ĉiu nacilingva komunumo. Strange, do, ke la Esperanto-komunumo ne rajtas al literaturo en sia lingvo, sen ke iu plendu pri maljusto.

Mi miras, ke oni rifuzas agnoski, ke la ĉefa maniero, en kiu Esperanto havas eĉ plej etan ŝancon sukcesi, ne troviĝas en tio, ke oni senĉese parolu en sia nacia lingvo (kutime plej oscedige) pri ĝi inter la jam konvertitaj, sed ke oni verku kaj agu per ĝi.

Al homoj, kiuj interesiĝas pri mia Esperantista agado mi kutimas montri interesan ĉiuteman revuon kiel „Monato“, romanojn kaj terminarojn. Tiele eblas al mi pruvi, ke Esperanto taŭgas al ĉiu formo de homa komunikado. Tiam malpropagandilon kiel nun fariĝis VP (La Verda Proleto), mi hontus montri al intereso. Uzante la anglan ĉe la kovrilpaĝo de sia revuo, SATEB efektive agnoskas, ke Esperanto ne estas facile lernebla kaj ke ĝi ne taŭgas por interkomprenado. Alivorte, SATEB perfidas la idealon de Zamenhof kaj samtempe forigas kialon por propra ekzisto.

Per multaj rimedoj oni povas fari revuon alireblan al veraj komencantoj de Esperanto, ekz. oni povas rigore redakti artikolon por forigi malfacilajn vortojn kaj gramatike kompleksajn frazojn, eblas enmeti glosaron por ŝpari al la leganto la neceson paŝi al la libro-breto por trovi vortaron, kaj oni povas dediĉi pli aŭ malpli da paĝoj al artikoloj kun plej simpla enhavo. Vera komencanto sendube dankeme profitus el tiaj eblecoj plibonigi sian scion. Kaj por informi ne-Esperantistojn eblas,

kiel faras la kamaradoj de SAT-Amikaro, enmeti unu apartan paĝon en ĉiun numeron kaj doni bazajn informojn pri Esperanto kaj pri la organizaĵo.

Sed bedaŭrinde, estas la malveraj, la t.n. 'eternaj' komencantoj, kiuj, per siaj plendoj, per siaj postuloj kaj per ŝajne fieraj fanfaronadoj pri propra nescio, superregas la voĉojn de ĉiuj aliaj. Kiel kancerō ili deinterne forroŝas kaj malfortigas la Esperanto-movadon, aparte en Britio. SAT havas laŭdindan tradicion pri servi la Esperanto-kulturon ĝenerale kaj diversrimede plialtigi la kulturalan nivelon de siaj anoj. Evidente, SATEB ne volas partopreni en tiu tradicio, kaj sekve mi ne plu volas partopreni en SATEB.

Por mi restas la demando: Ĉu mi povas montri trankvile nian LEA/G MAGAZINO'n al la ne-esperantista mondo, kiam la kovrilpaĝo de ĝi estas skribita germanlingve. ?

KH Kersting



Respondo de l'ĉefredaktanto:

Mi opinias, ke Krys Ungar nur parte pravas. Kiam iu volas legi gazeton el Hispanio aŭ Sud-Ameriko, tiu persono certe scipovas sufiĉe la hispanan lingvon. Li/ŝi scias, ke landaj gazetoj ne estas skribitaj en la lingvoj de tiuj lingvistudentoj, sed por la enloĝantoj de la lando. Kiam fremduloj ŝatas ricevi informojn pri la lando, ili tralegas priskribojn, kiuj preskaŭ ĉiam estas verkitaĵoj en la lingvo de la informserĉanto. Do, kiam esperantisto, kiu sufiĉe bone scipovas Esperanton, ŝatas legi Esperanto-tekstojn, li/ŝi tralegas Esperanto-gazetojn kaj -librojn. Kiam tiuj gazetoj enhavas tekstojn en nacia lingvo, tiam ili taŭgas por informi homojn pri Esperanto, ebligas al studentoj plibonigi la sciligojn kaj ankaŭ interesigi t.n. senfinajn lernantojn tamen legi Esperanto-gazeton.

KHK opinias, kiam li montras MAGAZINO'n kun kovrilpaĝon germanlingve skribitan, interesulo kritikus, ke la gazeto ne estus Esperanto-gazeto. Aliflanke mi dubas, ke li sukcesos varbi interesulon, kiam sur la kovrilpaĝo estas teksto en Esperanto, ĉar la alparolata homo ja nur povas legi la tekst-enhavon per lingvaj sciligoj. > Laŭ LEA/G-statuto, §6,2 estas pasivaj membroj ĉiuj personoj kaj organizoj, kiuj flegas kaj subtenas la ideon pri interpopola amikeco kaj samtempe LEA/G per financoj.< De tiu membro-grupo ni ne atendas lernadon de la lingvo, tamen ni daŭre interesiĝu pri Esperanto ĵus per germanlingvaj tekstoj en nia LEA/G-organo.

Kiam vi, kara legant(in)o, kontraŭas, sendu kritikan leteron al: MAGAZINO p.a. A.Stephán, Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch

GAJA DIVENO DE PROFESIOJ

lingvo 'nov-germana'

Ĉu vi estas juna, bela, dinamika, pli ol meznombre inteligenta, ne bezonas domon kaj laboras duoble pli ol viaj kolegoj? Tamen tiuj kvalitoj certe ne helpas vin, kiam vi serĉas novan laborlokon. Kiam vi studas la vakajojn en tagaj gazetoj, vi bezonas sciojn pri fremdaj lingvoj kaj/aŭ taŭgan bibliotekan enhavante vortarojn.

Ĉu vi scias, kiu estas 'hardware supporter' aŭ 'application engineer'? Ĉu vi ne scias? Ne gravas. En la gazetaj proponoj de laboroj vi trovos aliajn ofertojn ekz. 'researcher por industrial goods', 'oracle-spezialist'. Nu, jes, la lastan profesion vi povos traduki - per Esperanto. Tie estas ofertoj pri 'trailer-editor', 'design-center-manager' aŭ 'business-coordinator' ktp. Ĉu inter la ofertoj ne estas ion por vi? Vi eble lernis malĝustan metion. Ne malesperu. Jen aliaj profesioj: 'High-speed-board-designer' (Prononcu: Hai-spijed-bord-desaigner) aŭ 'junior-kontroler' (en Esperanto: Jun-kontrolanto). Ĉu sufiĉas? Feliĉe, vi legas, ke entrepreno serĉas 'vendiston por feraj dratoj'.

komplilis: Stefano

Lustiges Beruferaten

>neu-deutsch<

Sind Sie jung, gutaussehend, dynamisch, mehr als mittelmässig intelligent, brauchen keinen Schlaf und arbeiten Sie doppelt soviel wie Ihre Kollegen? Trotzdem, diese Qualifikationen helfen Ihnen sicherlich nicht bei der Suche nach einer neuen Tätigkeit. Laut den Stellenanzeigen in den Tageszeitungen benötigen Sie Kenntnisse in fremden Sprachen und eine taugliche Bibliothek mit Wörterbüchern.


Wissen Sie, was ein 'hardware supporter' oder ein 'application engineer' ist? Nein? Sie wissen es nicht. Das ist ohne Bedeutung. In den Stellenanzeigen werden Sie andere Angebote finden z.B. 'researcher por industrial goods', 'oracle-spezialist'. Nun, ja, das letzte Angebot können Sie mittels Ihrer Esperantokenntnisse übersetzen. Aber dann? 'trailer-editor', 'design-center-manager' oder 'business-coordinator' usw. Ist darunter nicht etwas für Sie? Sie haben möglicherweise den falschen Beruf erlernt. Doch seien Sie nicht hoffnungslos. Es gibt noch andere Stellenangebote: 'High-speed-board-designer'. Sprechen Sie den Beruf beileibe nicht aus wie geschrieben, sondern hai-spijed-bord-desaigner. Das Wort 'hai' kennen Sie gewiss. Rufen Sie es nicht Ihrer Freundin zu wenn Sie ihr begegnen? Sie können auch 'junior-kontroler' werden. Jugendkontrolleur ist damit nicht gemeint. Dann haben Sie Glück. Eine Firma sucht einen Verkäufer für Eisendraht.

Lingva angulo - Sprachchecke

Jeĵuri - Wer kennt es? Wie übersetzt man dieses Zeitwort? Es ist ohne Zweifel eines der interessantesten Gebilde im Esperanto. Dr.Zamenhof hat hier das Verhältniswort 'je' als Vorsilbe benutzt. Bekanntlich hat 'je' keine selbständige Bedeutung z.B. >stumpli je ŝtono< ...über einen Stein stolpern. Pri oder super wären hier fehl am Platze. Jeĵuri steht außer bei Wüster m.W. in keinem Wörterbuch, obwohl man ihm in den Werken von Zamenhof hier und da begegnet. Aus dem Satzinn ist die jeweilige Bedeutung ersichtlich. Folgende Wendungen sind bekannt: Jeĵuri kontraŭ iu ... sich gegen jemandem verschwören; Jeĵuri al iu ... jemandem die Treue schwören; Jeĵuri por io ... sich eidlich zu einer Tat verpflichten. - Die Tatsache, daß Dr.Zamenhof dem Tätigkeitswort jeĵuri drei Bedeutungen gibt, was eine starke Verwässerung des Begriffs zur Folge hat, beweist, daß es sich um eine Art Verlegenheitsbildung aus der Zeit handelt als man den wenigen Wörtern noch eine möglichst umfangreiche Bedeutung unterlegte. Wir verfügen heute über einen großen Wortschatz, so daß jeĵuri eigentlich bedeutungslos, gar überflüssig geworden ist.

M.Butin

NACISMO INTER BIRDOJ



"He, kion mi vidas? Ĉu fremda birdo troviĝas en niaj regionoj? For de ni! Al via varma lando!" Per ĉi tiuj vortoj la koko forpelle el 'sia regiono' la papagon. Same ankaŭ homoj agas. Do, bestoj 'instruas' nin pri nacismo.

("He, was sehe ich da? Ein fremder Vogel in unserer Region. Hau ab in dein warmes Land!" Mit solchen Worten verjagt der Hahn den Papagei aus dem Hühnerhof. So handeln auch die Menschen. So 'instrulieren' uns Tiere über den Nationalismus.)